

18-a Ekumena Esperanto-Kongreso (EEK)

60-a de IKUE - 57-a de KELI

21- 28 Julio 2007 en Pelplin, Pollando

“ .. Dio estas la amo .. (1 Joh 4,16)”

La ĉefa donaco de Jesuo - kaj ni ... ?

kune kun la 8-a JET'07 (8-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro)
samtempe samloke, sed ofte kun aparta programo

Jesuo Kristo preĝis por la unueco de la kristanoj. Kaj ni? Kio komune vivas kaj kreskas hodiaŭ en niaj kristanaj eklezioj? En ĉi tiu ekumena kongreso ni volas kune vivi kristane, preĝante kaj dialogante por plia progreso de amo kaj unueco inter la gefratoj de Jesuo Kristo - en ni kaj inter ni.

IKUE kaj KELI vokas la Kristanan Esperantistaron al 18-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Pelplin, Pollando, proksime de Gdansko kaj Malborko. Samtempe samloke okazas la 8-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro JET'07. Atentu la favorajn prezojn por familioj kaj junaj grupoj - ŝanco, kunvenigi konatajn gejunulojn kaj familiojn al nia Esperanto-kunveno. Estas antaŭkondiĉo, ke la gejunuloj kaj infanoj jam komencis lerni Esperanton. Tion konfirmu antaŭe grup-gvidanto aŭ gepatroj. Dum la kongreso ni donos kurson por komencantoj kun antaŭscioj, kaj paroligan kurson.

Bernhard EICHKORN

En la malgranda urbo PELPLIN la kongresejo estos la Alta Seminario (Supera Porpastra Seminario), Pl. Mariacki 2. Parto de la kongresanoj loĝas en la Collegium Marianum, Pl. Cystersów 1, 100 m distance de la kongresejo. La JET-anoj loĝas en ZS nr.1 (Mezlernejo), ĉe la strato/ul. Sambora 5, ĉ. 500 m distance de la Alta Seminario. Katedralo, Alta Seminario kaj Collegium Marianum troviĝas proksime en unu loko. En la Alta Seminario estas „Aula Magna” (granda salono), kelkaj pli malgrandaj aŭloj kaj refektorio (manĝejo). Ĉe la Alta Seminario estas bela ĝardeno, en kiu la partoprenantoj povas ripozi, promeni kaj mediti. Ducent metrojn de la seminario (kongresejo) estas bela palaco de dioceza episkopo Johano Bernardo SZLAGA kun vizitinda ĝardeno. **Jadwiga WASIUK**

Ni kore invitas vin aliĝi al nia 18-a Ekumena Esperanto-Kongreso Pelplin 2007

Philippe COUSSON kaj Miloslav ŠVÁČEK, prezidantoj de KELI kaj IKUE

Lajos KÓBOR kaj Bernhard EICHKORN de la Ekumena Komisiono

Jadwiga WASIUK < jagaw53@poczta.onet.pl >

kaj Edward KOZYRA < esperanto@powiat.malbork.pl >

por la Loka Kongresa Komitato

Atentu la informojn daŭre aktualigitajn en: www.bernhard-eichkorn.de

Aliĝilo sendota al

Jadwiga WASIUK, Strzelnica 8, PL 83-130 Pelplin < jagaw53@poczta.onet.pl >

Prezoj: Tarifo A: Iamaj socialismaj landoj escepte de la iama GDR, ĉiuj landoj de Azio (escepte de Arabio, Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko (escepte de Sudafriko) kaj Latina Ameriko.
Tarifo B: Ĉiuj landoj escepte de A.

4. KONGRESA ALIĜKOTIZO: (ne infanoj ĝis 9 jaroj): por validigi la aliĝilojn; ne repagebla.

ĝis 31.12.2006: A: 10.- €; B: 50.- €;
ekde 1.1.- 31.3.2007: A: 25.- €; B: 60.- €;
ekde 1.4.2007: A: 40.- €; B: 70.- €; *kontojn vidu sube punkto 10.*

5. KONGRES-KOTIZO: *pagenda en la kongresejo ekde 21.7.07 je 18h15 ĝis 28.7.07 matene.*

5.1. Prezo kun tranoktoj kaj po tri manĝoj

*(IKUE/KELI-anoj pagos 20 € malpli ol indikite. Kunportu vian membro-kotiz-kvitancon 2007 por pruvi vian membrecon!)
(signu por via memoro denove sur ĉi flanko de la folio, kion vi elektis en la aliĝilo)*

5.1.1. unu-lita ĉambro: 5.1.1.1. Alta Seminario (kongresejo): () 280.- €; 5.1.1.2. Collegium Marianum*: () 220.- €

5.1.2. du-lita ĉambro (*prezoj por unu persono*):

5.1.2.1. Alta Seminario (kongresejo): Tarifo A: () 180.- €; Tarifo B: () 220.- €

5.1.2.2. Collegium Marianum*: Tarifo A: () 140.- €; Tarifo B: () 180.- €

5.1.3. tri-lita ĉambro Collegium Marianum*: () 110.- €

5.1.4. kvar-lita ĉambro Alta Seminario (kongresejo): () 140.- €

5.1.5 ses-lita ĉambro Mezlernejo (gejunuloj): () 80 €;

se infano/junulo venas kun sia familio, validas la familiaj prezoj (vidu en la sekva ĉapitro 5.2)

5.2. Sub familio ni kalkulas minimume patron aŭ patrion kaj unu fil(in)on ĝis 25 jaroj, kaj maksimume gepatrojn kun siaj gefiloj malpli ol 26-jaraj antaŭ 29.7.07. Familio pagas kune krom la personaj aliĝ-kotizoj kongres-kotizon de 180 € (por ĉiu IKUE- kaj KELI-ano 20 € malpli). Infanoj ĝis 9 jaroj ne pagas aliĝ-kotizon. La gepatroj loĝas por la nomita prezo en Collegium Marianum*. Se en Collegium Marianum unu infano loĝas en la gepatra ĉambro (signu 2.1) aŭ pliaj infanoj en apuda ĉambro (signu 2.3.), ili pagos 20 € aldone por ĉiu infano ekde 10 jaroj loĝanta tie. Gepatroj povas loĝi ankaŭ en Alta Seminario (kongresejo) 2-lite sen infanoj (signu 2.2/unua krampo), aŭ kun unu aŭ du infanoj en kvar-lita ĉambro (signu 2.2/dua krampo), aŭ infanoj estu en apuda ĉambro (signu 2.3). Tiam oni alpagas po 40 € por ĉiu familiano loĝanta en Alta Seminario. Sen iu tia mendo la infanoj loĝas kun aliaj infanoj kaj gejunuloj en Mezlernejo (500 m for).

5.3. Grupo normale estas ĝis 6 gejunuloj (malpli ol 25-jaraj antaŭ 29.7.07), inter ili grupestro kaj eble vic-grupestro, kiuj povas esti pli aĝaj, sed unu el ili devas dormi kun la grupo en la Mezlernejo (500 m for de la kongresejo). JET'07 havas kelkajn apartajn programerojn. Aldone al la personaj aliĝ-kotizoj grupo kune pagas kongres-kotizon de 360 € (por ĉiu IKUE- kaj KELI-ano 20 € malpli). Povas esti 7a aŭ pliaj grupanoj, kiuj alpagos popersono 60 €. La grup-estroj helpas en la porjunulaj programeroj de JET.

6. Kiu venas jam vendrede povas tranokti pagante por tranokto dekonon de la kongres-kotizo (signu 1., lasta krampo), sed oni mem zorgu por la manĝoj ĝis sabato 18h15.

7. Prezo sen kongresaj tranoktoj (vidu 1./antaŭlasta linio): () semajno 200,- Zł/zlotoj.

8. Kunportu vian BIBLION. Ankaŭ la libro ADORU estas grava parto de la 18-a EEK. Ĉiu, kiu aliĝante montras sian propran libron ADORU, ricevas 10.- € da prez-redukto de sia kongres-prezo. La aliaj (ankaŭ la grupanoj) pagante la kongres-kotizon ricevas po unu libro ADORU, kiun ili povas redoni je la fino de la kongreso rericivante 5 €. La aliaj 5 € estas lu-prezo por la dum-semajna uzado de la libro, kiun ni poste ne plu povas vendi kiel nova. Familioj devas havi unu libron por du personoj ekde 10 jaroj.

9. IKUE- kaj KELI-membroj pagas 20 € malpli ol ne-membroj. Membrecon pruvas la kvitanco de pago de la membro-kotizo por 2007, kiun vi kunportu. Oni rajtas ĉe la kongresa kaso aliĝi al unu el ambaŭ organizoj laŭ la hejmlanda aliĝ-prezo laŭ la indikoj de IKUE kaj KELI, kaj tiam oni pagas la je 20 € reduktitan kongres-kotizon.

10. Kongresa Kaso: BANK SPÓŁDZIELCZY W SKÓRCZU, ODDZIA W PELP-LINIE, WASIUK Jadwiga – EEK, 12834200092007389930000001 (en Złoty/zlotoj).

- aŭ: GOSPODARCZY BANK WIELKOPOLSKI POZNAN' – GBWCPLPP, WASIUK JADWIGA – EEK, 12834200092007389930000001 (en €).

- el Eŭropa Unio: Bernhard EICHKORN, K-to 21 193 704 ĉe Postbank Stuttgart BLZ 60010070, IBAN: DE95 6001 0070 0021 1937 04; BIC: PBNKDEFF

- aŭ ĝenerale: UEA-konto echk-x de Bernhard EICHKORN. Tiam nepre informu lin: B.Eichkorn, Romäusing 20, D 78050 Villingen <Bernhard.Eichkorn@esperanto.de>.

Pagoj en Pelplin povas esti en Złoty/zlotoj (laŭ la aktuala kurzo) aŭ en €.

* = Collegium Marianum staras 100 m for de la kongresejo

Aliĝilo

sendota al: **Jadwiga WASIUK, Strzelnica 8, PL 83-130 Pelplin < jagaw53@poczta.onet.pl >**

Unuopuloj, geedzoj sen infanoj, same familioj kaj grupoj bezonas nur unu aliĝilon.

Gepatroj kun infanoj plenu ĝi ankaŭ punkton 2. Grupestroj ankaŭ punkton 3.

1. Unuopulo/patro/grupestro:

Nomo: _____
Bonvolu skribi vian familian nomon MAJUSKLE kaj la personan nomon minuskle!

Adreso: _____

telefono: _____ reta adreso: _____

- Ĉambro:** Mi mendas () unu-litan en () Alta Seminario aŭ en () Collegium Marianum;
- () du-litan en () Alta Seminario aŭ () C. Marianum, - () tri-litan en Collegium Marianum;
- () kvar-litan (nur en Alta Seminario) (kruc-signu vian deziron; prezoj dekstre en 5.1)
- () ses-litan (gejunuloj en la Mezlernejo kun jena kunulo en mia ĉambro: _____)
- () Tio estas mia edzino, por kiu mi ne plenigas plian aliĝilon.
- () Mi/ni volas partopreni la kongreson sen tranoktoj, sed kun 2 manĝoj tage (*atentu 7.*)
- () Mi/ni volas veni jam vendrede. (*Atentu la plian prezon sub 6.*)

2. Aliĝo de familio (5.2):

patro (*ripeto de 1.*): _____

patrino (*adreso kiel patro 1.*): _____

infanoj (*antaŭnomoj kaj enkrampe aĝo*): _____

2.1 () En nia ĉambro en Collegium Marianum loĝu kun ni jena infano en tri-lita ĉambro:

Tie disponiĝas nur du- kaj tri-litaj ĉambroj; atentu la prez-altigon 5.2.

Nomo de tiu infano: _____

2.2 Ni gepatroj volas loĝi en la Alta Seminario /() en du-lita ĉambro /() en kvarlita ĉambro kun unu aŭ du infanoj (*prez-altigo 5.2.*)

Nomoj de tiuj 2 infanoj: _____

2.3 () Jenaj infanoj loĝu en ĉambro apud ni (*enkrampe aldonu la aĝon de la infanoj*):

3. Aliĝo de grupoj (5.3): *se la grupo estas pli ol 6 personoj, aldonu liston de la partoprenantoj*

1. Grupa responsulo (*Nomo*): _____

Mi konfirmas, ke ni lernis Esperanton. Venos jenaj grupanoj (*aldonu enkrampe la aĝon*):

2. Grupa vic-responsulo: _____

Anoj: 3. _____ 4. _____

5. _____ 6. _____

3.5 Manĝoj: *normale vi ricevas tri manĝojn matene, tag-meze kaj vespere*

3.6 () Mi/ni deziras vegetarajn manĝojn

3.7 Mi/ni ne partoprenos ekskurson al: () Malbork (minus 5 €) - () Gdansk (minus 10 €)

3.8 Mi proponas jenajn miajn kontribuojn al la kongresa programo (temo, daŭro):

Loko/dato/subskribo por akcepto de la kondiĉoj: _____

La aliĝo validas post alveno de la aliĝ-sumo por ĉiu persono.

PROVIZORA KONGRESA PROGRAM-SKIZO

Vendredo, 20. julio 2007 — **Akcepto:** 16h-18h, 20h-21h. Kiu volas tranokti en la kongresejo, pagos dekonon de sia kongres-kotizo kaj zorgos mem pri la vesper-kaj matenmanĝo.

Sabato, 21. julio 2007 — **Akcepto:** 10h-12h, 15h-17h, 19h-21h. * 18h15 Vespera manĝo * **19h30 Inaŭgura vespero (ADORU).**

Dimanĉo, 22. julio 2007 — 08h15 Matena manĝo * **10h00 Solena Sankta Meso** * **10h30 (?) Evangelia Diservo** * 13h00 Tagmeza manĝo * **17h00 Ekumena Diservo (ADORU)** * 18h15 Vespera manĝo * **19h30 Solena Malfermo.**

Lundo, 23. julio 2007 — 07h00 Sankta Meso (kun ADORU) * **07h45 Ekumena maten-preĝo (ADORU)** * 08h15 Matena manĝo * 09h00 Komuna kantado (kun ADORU) * **10h00 Prelego: La Ĉef-temo “Amo”** * **11h00: Prelego** * 12h30 Tagmeza preĝo (kun ADORU) * 13h00 Tagmeza manĝo * **16h00 Prelego: “Amo” en la BIBLIO** * **17h00: Prelego: Jacques Tuinder: Evidente - amo por blinduloj** * 18h15 Vespera manĝo * 20h00 Vespera programo.

Mardo, 24. julio 2007 — 07h00 Sankta Meso (kun ADORU) * **07h45 Ekumena maten-preĝo (ADORU)** * 08h15 Matena manĝo * 09h00 Komuna kantado (kun ADORU) * **10h00 Prelego** * **11h00: Prelego** * 12h30 Tagmeza preĝo (kun ADORU) * 13h00 Tagmeza manĝo * **16h00 Prelego: “Amo” en la BIBLIO** * **17h00: Prelego: Stanisław PŁACHTA: La revuo frateco** * 18h15 Vespera manĝo * 20h00 Vespera programo

Merkredo, 25. julio 2007 — Tuttaga ekskurso al Gdansko

Ĵaŭdo, 26. Julio 2007 — 07h00 Sankta Meso (kun ADORU) * **07h45 Ekumena maten-preĝo (ADORU)** * 08h15 Matena manĝo * 09h00 Komuna kantado (kun ADORU) * **10h00 Jarkunveno de KELI** * **11h00 Ĝenerala Kunveno de IKUE** * 12h30 Tagmeza preĝo (kun ADORU) * 13h00 Tagmeza manĝo * 14h00 - 18h30 Posttagmeza ekskurso al Malborko * 18h45 Vespera manĝo * 20h30 Vespera programo

Vendredo, 26. Julio 2007 — 07h00 Sankta Meso (kun ADORU) * **07h45 Ekumena maten-preĝo (ADORU)** * 08h15 Matena manĝo * 09h00 Komuna kantado (kun ADORU) * **10h00 Prelego** * **11h00: Prelego** * 12h30 Tagmeza preĝo (kun ADORU) * 13h00 Tagmeza manĝo * **16h00 Prelego: “Amo” en la BIBLIO** * **17h00: Prelego** * 18h45 Vespera manĝo * **20h00 Adiaŭa vespero**

Sabato, 28. julio 2007 — 07h00 Sankta Meso (kun ADORU) * **07h45 Ekumena maten-preĝo (ADORU)** * 08h15 Matena manĝo * Adiaŭo

Bus-organizantoj atentu. Ni subvencias la organizadon de buso el ekster Pollando jene: Kiam via buso atingos Pelplin, vi ricevos 500 € por la buso (havanta minimume 9 aliĝintojn) kaj po 10 € por ĉiu aliĝinto, kiu veturis kun via buso. Krome la bus-stiranto (en buso pli granda ol 9 sid-lokoj) respektive la du bus-stirantoj de minimume 45-seĝa granda buso ricevas senkosta(j)n loĝ- kaj manĝ-loko(j)n dum la tuta semajno, se (i)li pretas veturi kun sia buso al niaj ekskurs-lokoj kontraŭ pagado de la bezonata brulaĵo. *Bernhard EICKORN*

Pelplin oni atingas:

- trajne ĉiun duan horon de Gdansko, tra Tczew (60 km); de Tczew (stacidomo) pli favore per buso, ĉiun 40an minuton. Aŭ trajne ĉiun trian horon de Bydgoszcz, 150 km al Pelplin (En Pelplin el stacidomo kaj bus-stacio al kongresejo 600 m)
- per aŭtomobilo – land-vojon n-ro 1, forlasu ĝin en la vilaĝo Rudno al Pelplin.
- per aviadilo al la flughaveno ĉe Gdansko, 68 km al Pelplin per trajno (vidu supre).

La historio de Pelplin estas ligita kun la katedrala baziliko. Konstruis ĝin la ordeno de Cistercianoj. En la 19-a jc. la cistercianan kulturon transprenis la loka eklezio, ekde 1992 diocezo Pelplin. En la urbo loĝas 17 mil homoj. Sur la tombejo troviĝas la tombo de episkopo (esperantisto) Konstanteno Dominik (estonta beatulo). En la Dioceza Muzeo troviĝas Biblio de Gutenberg.

Jadwiga WASIUK